# Svisa Esperanto-Societo informas

**1999 numero 4a: septembro / oktobro**

Redakcio:
Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5
Retadreso :<gacond@bluewin.ch>
✆ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32
Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude GACOND

# Vivo de SES

## Interregiona Kultura Kunveno de SES

**sabaton 23an de oktobro**

Hotelo Le Montbrillant
Rue de Montbrillant 2

**Genève**

Aŭtune dum multaj jaroj okazis en Cully la tradiciaj regionaj kunvenoj, la famaj Kulturaj Semajnfinoj de Svisa Esperanto-Societo iniciatitaj de Claude GACOND kaj Nicole MARGOT. Manke de organizantoj por tiu bela aranĝo SES serĉis ĉijare novan koncepton por daŭrigi la tradicion. Tial ni limigos la kunvenon al unu tago, al nur la sabato, kio simpligos la organizon.

Nun ni do invitas vin al partopreno de la ĉisekva kultura renkontiĝo, kie ni atendas ankaŭ francajn esperantistojn.

### Kunvenejo

**Hotelo Le Montbrillant**
rue de Montbrillant 2, salono teretaĝa.

Tiu hotelo situas rekte malantaŭ la stacidomo de Genève. Ĝi atingeblas tra la subpasejo.

### Programo

Prelegos nia fama **Claude PIRON** pri temoj esperantaj kaj psikologiaj :

10h00 : **Enkondukaj vortoj** de Bruno GRAF, prezidanto de SES.

10h15 : Unua prelego de Claude PIRON : **Etimologio de Esperanto.**
11h15 : Dua prelego : **Kiom Esperanto taŭgas por kanto-tradukado**, kun kantataj ekzemploj gitar-akompanataj fare de la preleganto mem.
12h30 : Tagmanĝo en la restoracio.
14h00 : Tria prelego : **Hipnoto**.
15h00 : Kvara prelego de Claude PIRON : **Kion fari por pli feliĉi ?**

Lastjare la preleganto aperigis franclingvan libron tiurilatan :

***Le bonheur clés en mains*.**

## Kotizoj

La partoprenkotizoj pageblos surloke :

CHF 10.- : gejunuloj kaj JES-anoj.

CHF 20 : plenkreskuloj.

CHF 30 : paroj.

## Aliĝoj

Pro organizaj kialoj bonvolu anonci vian partoprenon ĝis la 9a de oktobro al unu el ĉi-sekvaj organizantoj :

ĉu al Bruno GRAF, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen. ✆ 031 921 44 59.

ĉu al Christiane SIXTUS POT, chemin des Mollex 15, 1258 Perly. ✆ 022 771 24 37.

# La Estraro informas

### Kunsidoj

La laborgrupo pri varbado kunsidis la 5an de junio en Bern kaj samurbe la SESestraro la 3an de julio. Ni ĉerpas el la raportoj la plej interesajn erojn por diskonigo al la legantaro de *SES informas*.

### Informado

La laborgrupo kreis plurkoloran afiŝon por konigi kaj vendi la germananlingvan gvidilon ***Esperanto – Wort für Wort***, Kauderwelsch Band 56, eldonita de Verlag Peter Rump en Bielefeld. Ĝi estas praktika helpilo por vojaĝemuloj, kiuj interkompreniĝas per esperanto. La grupoj estas petataj pendigi tiun afiŝon okaze de la agotagoj 99 en librovendejoj kaj magazenoj. La projektoplano aperis en *SES informas* 1999-3 p. 6-7. La estraro decidis doni premion de CHF 100.- al la grupo aŭ membro, kiu pendigos plej multe da afiŝoj.

La Migros-Lernejo en Lausanne pretas montri ekspozicion pri esperanto kaj pri la lingvo-problemo dankal rilatoj kun François RANDIN. Ĝi disponigos salonon kun montrejoj kaj zorgos pri la informado kaj reklamado. François RANDIN planas kaj kreos la ekspozicierojn kun kunlaborantoj. Temas pri grava esperanta projekto en Romandio.

Ni volas informi kaj varbi pri esperanto en interreto. Tiucele ni plibonigas la hejmpaĝojn kaj aldonas indikojn, kiel lerni esperanton per interreto. Per tiu rimedo ni intencas alparoli antaŭ ĉio la junularon kaj lanĉi la agadon per gazetanoncoj.

Ni volas influi la instruistan medion kaj pretigas tiucele gazetartikolojn kaj anoncojn por porinstruistaj organoj. Teamo ellaboras la projekto-planon. Unue informi, poste varbi.

**Kongresoj**

Estis decidite, ke Mireille GROSJEAN salutos la 84an Universalan Kongreson de Esperanto en Berlin kaj partoprenos la komitatkunsidojn nome de SES, kaj ke poste ŝi ĉeestos parton de la ILEI-konferenco en Karlovy Vary.

La estraro decidis ne sendi observanton al la 2a Forumo de la Esperanta Civito en Karlovy Vary. Tamen ni observos la evoluon de la projekto.

**Regiona vivo**

En Zürich la Esperanto-Societo organizas standon ĉe Bahnhofstrasse por la 4a de septembro kaj petis tiucele la surlokan helpon de aliaj grupoj. Ni gratulas pro la iniciato.

La estraro aprobis la novan formon de la regiona kunveno en Romandio. La 23an de oktobro ni esperas renkonti en Genève ankaŭ francajn esperantistojn. La akirotaj spertoj montros, kiel daŭrigi la organizon de tiu kultura aranĝo.

**Serĉo de novaj komitatanoj**

La estraro maltrankviliĝas, ĉar mankas kandidatoj por la kasista kaj sekretaria funkcioj. Barbara POCHANKE kaj Angelo MELLINI volas retiriĝi komence de la jaro 2000. Jam demisiis Nicole BEROUD kiel protokolantino.

**Financoj**

La lasta domo de Gastejo Edmond Privat en La Chaux-de-Fonds estas vendita al Kultura Centro Esperantista. SES konfirmis al la notario, ke ĝi lasas krediton de CHF 15'000.- favore al la nova posedanto. La restanta saldo de ĉirkaŭ CHF 5'000.- estas repagenda al SES fare de Gastejo Edmond Privat.

Claude GACOND informis en la jarraporto 1998a de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, ke li intencas aĉeti komputilan sistemon por la katalogado kaj petas pri mona helpo. La estraro principe jesas financan subtenon kaj decidos, post kiam la sistemo estos mendita.

La prezidanto : Bruno GRAF.

**PS.** Aldonindas, ke la estraro antaŭvidas kunsidi la 22an de januaro 2000 por la traktado de la jarraporto, de la jarkalkulo kaj de

la bilanco de 1999 kaj de la buĝeto por la jaro 2000. Ĝi planas okazigi la Ĝeneralan Kunvenon de SES je la 8a de aprilo en Luzern. Sed tio estas nur intenco, kiun ni konfirmos aŭ aliigos en la novembra numero de *SES informas*.

La redaktoro : Claude GACOND

## Kasisto kaj sekretario serĉataj

Barbara POCHANKE kaj Angelo MELLINI deziras retiriĝi el la SES-estraro komence de la jaro 2000. Tial vakos iliaj funkcioj de kasisto kaj sekretario. SES serĉas posteulojn kun la jenaj kvalifikoj :

Kasisto : Kapablo prizorgi librotenadon de societo kun 170 membroj. Dezirataj estas administraj spertoj.

Sekretario : Kapablo korespondi, informi kaj protokoli. Dezirata estas scipovo labori per komputilo.

Funkciuloj de lokaj grupoj aŭ aliaj interesatoj, ankaŭ se nemembroj de SES, estas bonvenaj kaj trovos stimulan taskon.

Jare okazas 2 aŭ 3 kunsidoj en Bern. La veturkostoj kaj spezoj estas repagataj.

Ne hezitu transpreni respondecon. Tio estas bona okazo por perfektiĝi en la esperanto-praktiko.

Interesatoj bonvolu kontakti kiel eble plej baldaŭ la prezidanton : Bruno GRAF, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen. ✆ 031 921 44 59.

## Donacoj

La kasisto Barbara POCHANKE dankas pro la sekvaj donacoj en CHF:

Donacoj por la **Agado 2003** : Françoise BADOUX : 20 ; Danièle BIGNENS-VOLPE :55 ; Tazio CARLEVARO : 25 ; Odette FREGONARA : 30 ; Walter GIANNINI : 50 ; Jean-Rodolf LAEDERACH : 25 ; Jean-Jacques kaj Eliane LAVANCHY:100 ; Madeleine STAKIAN :20 ; Amalie VEITH : 50 ; Henri WETTSTEIN : 50.

Donacoj por SES mem : Sonja BRUN : 20 ; Pierre DORTHE : 15 ; Wolfgang GASSER : 30 ; Alice KESSLER : 15 ; Alois KOLLER : 45 ; Alice QUAGLIA : 5 .

## Redaktaj limdatoj

Por ***SES informas*** **1999-5** (novembro + decembro) : 20an de oktobro.

Por ***SES informas*** **2000-1** (januaro + februaro 2000) : 20an de decembro 1999.

# Movada vivo

**CDELI**

**Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia**

**Biblioteko de la Urbo**

**Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds**

✆ 032 967 68 55.

**Fakso** 032 967 68 29.

Retadreso : <gacond@bluewin.ch>

Dum la somero Claude GACOND instaligis en sia hejmo la interretan servon kaj helpe de kunlaborantoj li nuntempe lertiĝas en la interreta rilatado kaj pretigas hejmpaĝojn, kiuj interalie donos la eblon konsulti la listojn de la aĉeteblaj aŭ interŝanĝeblaj brokantaĵoj de CDELI. Certe sekvos paĝo pri la riĉaĵoj de CDELI, kiam la perkomputila katalogado de la kolektoj estos solvita.

Riparoj en la biblioteka domo malfavoris la surlokajn aktivecojn dum la someraj lernejaj ferioj. Tamen kelkaj esplorantoj kaj vizitantoj povis esti kontentigitaj.

Pro feriaj kaŭzoj CDELI estos fermita de la 8a ĝis la 21a de septembro. Do nur ekde la fino de la septembra monato rekomencîĝos la regulaj aktivecoj : registado kaj katalogado de la alvenaĵoj libraj, dokumentaj, gazetaj, artikolaj ; alvokado de redakcioj kaj eldonejoj ; ordigado de arkivaĵoj, ktp...

Samideanoj kaj esperanto-amikoj el la regiono, kiuj pretus alporti regulan helpon ĉu kadre de la laborgrupo de la merkreda mateno, ĉu aliel kaj aliam, estas bonvenaj. Ne estas la taskoj, kiuj mankas. Helpemuloj esprimu sian kunlaboremon. Por posedanto de komputilo dankal la interreta sistemo estos eĉ eble kunlabori el la propra hejmo. Do eĉ el fora loko eblos alporti sian kunlaboron, kondiĉe ke almenaŭ unufojon jare oni pretu veni en La Chaux-de-Fonds por la planado kaj reorientigo de la transprenita tasko kaj por la kunordigo de la funkcioj.

**K.C.E.**

**Kultura Centro Esperantista**

**Strato Postiers 27, Poŝtfako 311**

**2301 La Chaux-de-Fonds.**

✆ kaj fakso: (032) 926 74 07.

Retadreso :

<kce.esperanto@bluewin.ch>

## Kulturaj Monatfinoj

**Septembro 25-26 :** La septembra monatfino estos dediĉita al la esperanto-informado. Speciala gasto estos la libro

*Esperanto sen Mitoj*, kies aŭtoro Ziko SIKOSEK ankoraŭ ne certigis ĉeeston. Estas invititaj ankaŭ Giorgio SILFER kaj Marco PICASSO. La vespera programo inkluzivos la tradician fonduon kaj etan kinoklubon.

**SES rekomendas partoprenon al tiu ĉi grava semajnfino. Tial ĝi repagos po CHF 30 al ĉiu SES-membro, kiu ĉeestos ĝin. Tio signifas repagon de 50% de la aliĝkotizo.**

Pro la samtempa okazigo de la SES-Tago en Genève, la oktobra monatfino ne okazos. Sed KCE organizas karavaneton al la Mediteranea Konferenco de Esperantologio en Sète (Francio) 29an de oktobro – 1-an de novembro. Prelegos interalie Daniele VITALI kaj Michel DUC GONINAZ. Interesatoj bonvolu kontakti la sekretariejon de KC E.

Notu kaj rezervu la daton de la novembra Kultura Monatfino : 27-28ajn.


**SAEF**

**Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj**
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10
**8405 Winterthur** ✆ 052 233 47 64


Pri la ĉijaraj okazintaĵoj ni menciu, ke estrarkunsidoj okazis en Winterthur la 22an de februaro kaj 13an de marto. Ernst GLÄTTLI, la sindonema sekretario de SAEF, ne nur partoprenis la SES-labortagon de la 6a de marto. Kiel vi legas en la programo de la lokaj grupoj, li nuntempe prelegas pri sia vojaĝo en la balkanlandoj. La 19an de marto kun Gertrud EGGENBERGER, la prezidantino de SAEF, li ĉeestis la delegitaran kunsidon de la Unuiĝo Arta kaj Intelekta de Svisaj Fervojistoj (VKES = *Vereinigung Kulturpflegender Eisenbahner der Schweiz*).

La Ĝenerala kunsido de SAEF okazis en la stacidomo de Olten la 27an de la sama monato, kaj la 24an de aprilo en la stacidomo de Luzern la GERI-aranĝo. (GERI = Gaja Esperanto-Rondo Instruiteca). Samstacidome baldaŭ disvolviĝos nova GERI-aranĝo la 13an de novembro.

La 51a Kongreso de Internacia Federacio de Esperanto-Fervojistoj (IFEF), al kiu partoprenis 3 SAEF-anoj, disvolviĝis en Le Mans (Francio) de la 8a ĝis la 15 de majo. En 2000 la 52a IFEF-Kongreso okazos en Budapest (Hungario) de la 13a ĝis la 19a de majo. Ni atentigu, ke al tiu ĉiam tre interesa internacia kongreso povas partopreni ne nur fervojistoj, sed ankaŭ trajnemuloj. Interesatoj ne timu peti informojn al la SAEF-prezidantino Gertrud EGGENBERGER.

# Svisa ILEI-Sekcio

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Prezidanto : François RANDIN,
Vallombreuse 14, 1004 Lausanne
Retadreso :
<francisko@esperanto.nu>

Pri lingvoinstruado en Svislando regas nuntempe esplorema kaj diskutema etoso pro du kaŭzoj :

Unue la registaro de la zurika kantono decidis enkonduki la instruadon de la angla lingvo por ĉiuj lernantoj jam ekde la elementa instrunivelo. Tio rompis la tabuon, kiu en la instrumedioj kvazaŭ malpermesis diskuti pri la lingvoekvilibro en Svislando.

Due kaj reage al tiu fakto la Svisa Konferenco de la Kantonaj Instru-Direktoroj (EDK / CDIP) petis profesoron G. LÜDI kaj aliajn verki ĝeneralan raporton pri la lingvoinstruado en Svislando.

La Svisa ILEI-Sekcio skribis al tiu instanco kaj al profesoro LÜDI mem por informi ilin pri la ebloj de esperanto.

Plia paŝo favora al esperanto estis farita la 28an de majo 1999 en Neuchâtel. Mireille GROSJEAN rajtis instali standon pri esperanto en tutsvisa unutaga kongreso, dum kiu Romanda Instituto pri Pedagogia Esploro (IRDP = Institut de Recherche et de Documentation Pédagogique) prezentis la eblajn sekvojn al la LÜDI-raporto. Tiu stando konsistis el afiŝo (100 x 70 cm) pri la propedeŭtika valoro de esperanto kaj el tablo kun multaj malsamaj varbiloj eldonitaj de SAT en la franca lingvo. Partoprenis la kongreson proksimume 200 fakuloj pri lingvo-instruado.

# Grupa vivo

## Basel

**Esperanto-Societo Basel**
PF 103, 4005 Basel
✆ 0049 76 214 57 12
Kunvenoj: 20h00 en Altersheim, Neubad

### Venonta kunveno

**Septembro 22an** je la 20h00 en la restoracio Weiherhof, Neuweilerstr. 107, finhaltejo tramo 8. Hanspeter montros lumbildojn pri sia velŝipado de Athen al Rhodos.

## La Chaux-de-Fonds

Studa rondo ĉe CDELI

ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND kaj aliaj instruantoj

**Notu en via agendo, ke la venontaj kunvenoj** okazos septembre la 22an, oktobre la 13an kaj la **mardon** 26an, novembre la 10an kaj 24an, decembre la 8an, januare 2000 la 12an kaj 26an.

En majo ni ludis kaj diskutis, en junio ni spektis videobendojn en posedo de CDELI.

Venontsezone ni donos al ni reciproke taskojn, kiuj celu riĉigi nian lingvouzon kaj fajnigi niajn vortfaradajn konojn. Do ĝis baldaŭ !

## Genève

**Esperanto-Grupo "La Stelo"**
Case postale 188, 1211 GENÈVE 20
✆ 022 740 04 45
Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon en la restoracio « *Les Cheminots* », 7, rue des gares, Genève

### Programo

**Septembre la 7an** : vespermanĝo ekde la 19h00, vespera programo ekde la 20h00.

**la 16an** : Komenco de la parol-iga kurso, kiun gvidos Claude PIRON ĉiujn ĵaŭdojn de la 12h00 ĝis la 13h00 en *Maison du Quartier, Plainpalais*, 1, rue de la tour, Genève. Ricevas la aliĝojn François PERRET, CP 3, 1211 Genève 9.

**Oktobre la 4an :** komenco de la esperanto-kurso por komencantoj kaj progresantoj en *Université Populaire du Canton de Genève*. Aliĝa adreso : UPCG, 23, rue du Vuache. ✆ 345 50 10. Kosto por la jaro : CHF 65.-

**la 5an :** Ernst GLÄTTLI el Brugg raportos pri *Neforgeseblaj travivaĵoj okaze de vojaĝo tra la balkanlandoj.*

**la sabaton 23an : Interregiona Kultura Kunveno en Genève :** Konsultu la detalan programon komence de tiu ĉi numero de *SES informas*.

**Novembre la 2an** : temo fiksota.

**Decembre la 7an** : *Esperanto kaj kongresoj : riĉigaj renkontiĝoj* kun Yvonne kaj Armand COTTON.

**Januare 2000 la 4an** : *Vojoj al bona interkompreniĝo* kun Mireille GROSJEAN.

## Lausanne

**Laŭzana Esperanto-Societo**
Case postale : 389, 1009 PULLY
✆: (021) 729 58 02
Retadreso
< lausanne.ch @ esperanto.nu>
Hejmpaĝo: http://www.esperanto.ch
**Kunvenoj**: Stacidomo, 1-a etaĝo, 20h30
**Diskuta rondo**: ĉiumonate je la tria lundo en hotelo Continental : 18h00-20h00.

**La venontaj kunvenoj** okazos septembre la 6an : kun la temo esperantaj malfacilaĵoj gramatikaj kaj organizaj, oktobre la 4an, novembre la 8an kaj decembre la 12an kun Zamenhofa Festo.

### Raportoj

Ĉe François RANDIN la feria pasporto estis sufiĉe sukcesa. Jacqueline VASSEROT kaj Lucienne DOVAT, kiuj helpis dufoje havis 8 kaj alifoje 7 entuziasmajn geknabojn tre sci-

volemajn, kiuj rapide asimilis ĉion kaj petis plilongigi la kunvenon pro kreskanta scivolemo.

La ekskursa tago de la 27a de junio ankaŭ bone sukcesis unue per agrabla ŝipado sub la suno de Yverdon ĝis Estavayer. Post vizito de la urbeto kaj de ties muzeo kun ranoj kaj aliaj folkloraĵoj, krom 2 piknikantoj, la babilemaj promenantoj ĝuis tagmanĝon sur restoracia teraso. Sekvis marŝado tra la tritika kamparo ĝis la preĝejeto de Font. Poste la pado pli malpli laŭiris la lagon ĝis entrajniĝo en Cheyres. En Yverdon la venintoj el aliaj lokoj adiaŭis nin. Kaj nur inter Lausanne-societanoj ni daŭrigis niajn konversaciojn.

Neordinara ankaŭ estis la 24an de junio la la prelego de Marco PICASSO, kiu interese prezentis kaj analizis sian romanon *La Tunelo*. Venis esperantistoj el Genève kaj aliaj lokoj por lin aŭskulti.

Laŭ Jaqueline VASSSEROT

Poznan, la 15an de julio 1999

Tre estimataj gesinjoroj. Mi afable petas vin pri adresoj de esperantistoj, kiuj deziras korespondi kun mi. Mi havas 27 jarojn, Mi estas fraŭlo kaj pentristo.

Kristofer JARECKI
Rynek Lazarski 9/15
PL-60-731 POZNAN (Pollando)

# Luzern

**Lucerna Esperanto-Societo**
Adligenstr. 1/49, 6020 **Emmenbrücke**
✆ 041 280 46 12.

**Kunvenoj:** ĉiun duan ĵaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

## Pri nia somera ekskurso

La tago de nia delonge atendita ekskurso – la 10a de julio – bedaŭrinde komenciĝis grize, sed tamen kelkaj entuziasmaj LES-anoj ne malkuraĝiĝis kaj bonhumore ekaŭtomobilis el Emmenbrücke al Entlebuch kaj ekde Holzwegen marŝis sur bonaj padoj supren, supren, supren…

Kiam ni fine alvenis sur la alpon Ober-Änzi (1432 m), la nebulo ĉirkaŭis nin. Afabla alpano bonvenigis nin kaj invitis nin al sia komforta sidĉambro bone hejtita, kie ni povis iom ripozi kaj revarmiĝi.

Iom post iom la vetero tamen pliboniĝis, kaj ni povis fine ĝui la elvidon kaj pretigi nian tagmanĝon krad-rostante kolbasojn kaj stekojn.

La jodlo-klubo, kun kiu ni kombine faris tiun ekskurson, ĝojigis nin la tutan tagon per folklora

kantado, kaj nia prezidanto Paul SCHERER same per belega akordiona muziko. Ne mankis kantoj, spritaj rakontoj kaj kompreneble informado pri esperanto al niaj jodlaj geamikoj.

Kiam la LES-anoj ekrealvalis, la jodlo-klubo adiaŭis nin per speciala kanto pri amikeco.

Tiu tago ne estus povinta esti pli esperantist-etosa.

Laŭ Sonja BRUN

## Venontaj kunvenoj

**Septembre la 16an :** Kun Paul SCHERER : 4 komponistoj, kiuj mortis antaŭ 400, 200 kaj 100 jaroj.

**Oktobre la 21an** : Kun ges-roj SCHERER : La 84a UK en Berlin.

## Wil

**Esperanto-Klubo Wil**
Stanislaw POCANKE, prezidanto
Letenstr. 70, 9500 Wil
✆ 071 911 68 30
**Kunvenoj** la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntis-strato 1.

### Ekskursa impreso

Organizita de Verena CHAVES-WALDER, la ekskurso de la 4a de julio al Rappenloch-Schlucht ĉe Dornbirn (Austrio) kun konkluda vespero en la Sunhejmo de Hans KÄSTLI en Rheineck, vigle impresis partoprenintion, kiu aludas al zamenhofa poemo:

*La 4an de julio renkontiĝis areto da ekskursemuloj translime en ekstremokcidenta Aŭstrio. La itinero kondukis nin tra Bregenz ĉe Konstanca Lago kaj tra Dornbirn al la Gorĝo Rappenloch-Schlucht, kiu estas majesta vidindaĵo. Torenta river-eto traboris sian vojon en profunda valo. Pli efike traboras la monton granitan akvego abunda, ol guteto konstante frap-anta ! Estu la naturo nia instru-anto.*

Dieter ROOKE

### Nova kunvenejo

Esperanto-Klubo Wil ĝojige trovis novan renkontejon, kiu estas la restoracio **Blumeneck** ĉe Säntisstrato 1. Ĝi situas tuj apud la malantaŭa elirejo stacidoma vidalvide de la poŝtejo.

La klubaj renkontiĝoj okazos tie ĉiun unuan merkredon de la monato (krom en aŭgusto) je la 19h00. La prelegoj kaj aliaj programeroj ekdisvolviĝos je la 19h30.

Jen la programo ĝis la fino de la jaro 1999a :

**Septembre la 1-an** : Impresoj el Usono : kun Vera kaj Barbara POCHANKE.

**Oktobre la 6an** : La 84a Universala Kongreso de Esperanto en Berlin per lum-bildoj : kun Stanislaw POCHANKE.

**Novembre la 3an** : Neforges-eblaj travivaĵoj okaze de vojaĝo

tra la balkanlandoj : kun Ernst GLÄTTLI.

**Decembre la 1-an** : Zamenhofa vespero : kun ĉiuj klubanoj.

# Zürich

**Esperanto-Societo Zürich**
Akazienstr. 6, PF 858, 8034 ZÜRICH
✆ 01 25 150 25
Retadreso : info@esperanto.ch
Hejmpaĝo : http : //www.esperanto.ch
**Kunvenoj**: 20h00, Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich

## Programo

**Septembre la sabaton 4an** de la 9h00 ĝis la 16h00 : Stando sur la Bahnhofstrasse.

**la 24an** je la 20h00 : inaŭguro de la pentraĵekspozicio de Jakob WEIDMANN en la Esperanto-Librejo.

**Oktobre la vendredon 1-an** je la 20h00 : komenco de la ses-vespera Kuba Dancokurso.

**La sabaton 2an** de la 12h15 ĝis la 14h00 : komenco de la esperanto-kurso por komencantoj, kiu daŭros 6 sabatajn posttagmezojn.

**La lundon 11an** je la 20h00 : Monata kunveno kun retrorigardo al la 84a Universala Kongreso de Esperanto en Berlin.

**Novembre la lundon 8an** : Lego-rondo : Ni kune studos kaj diskutos la libron de Tazio CARLEVARO *Ĉu esperanto postvivos la jaron 2046 ?*

**Decembre la sabaton 4an** je la 14h00 : Zamenhofa Festo kun riĉa kultura programo.

Aŭskultu la lokan elsendon
**Esperanto-Anteno**
sur Radio Lora ĉiun ĵaŭdon je la 15h20 je 97,5 megahercoj.

# Eĥoj el svisa partopreno en kongresoj

**Dankoj**

La redakcio de *SES informas* dankas partoprenintojn al esperanto-kongresoj pro la vivsignoj, kiujn ili sendis el diversaj lokoj. Iliaj salutoj atestas pri la ĉeesto de svisaj samideanoj en multaj renkontiĝoj.

**Eĥoj el tiuj vivsignoj**

Ne detalajn raportojn pri la koncernaj okazaĵoj ni liveras al vi helpe de la ricevitaj leteroj, faksoj kaj interretaj mesaĝoj, sed simplajn eĥojn el kelkaj okazaĵoj.

La malfermo de tiu ĉi rubriko instigu la partoprenantojn al venontaj internaciaj aranĝoj neniam forgesi sendi saluton al la redakcio de *SES informas*, por ke

nia bulteno povu iom rakonti pri iliaj impresoj.

**Al kolektiva sinteno**

Ne nur individue ni ĝuu pri la kontaktoj, kiujn ebligas al ni esperanto. Ankaŭ kolektive esprimiĝu niaj travivaĵoj. Tio certe instigos lingvo-komencantojn siavice ankaŭ viziti aranĝojn kaj ankaŭ konigi siajn impresojn tra nia bulteno.

**Atentigo pri okazontaĵoj**

Tial lastpaĝe de nia bulteno malfermiĝas rubriko mencianta vizitindajn aranĝojn. Tio neniel celas konkurenci al *Heroldo de Esperanto* aŭ *Eventoj*, kies rolo estas ĝuste tre sisteme anonci okazontaĵojn. Nur atentigon pri kunvenoj en najbaraj landoj aŭ pri eksterordinaraj programoj ni celas. Tion farante, ni scias, ke ni kontentigos plurajn legantojn.

Claude GACOND

# Eĥoj el la 84a UK

La 84a Universala Kongreso en Berlin jam apartenas al la pasinteco. En tre bela kongresejo intermiksiĝis 2712 partoprenantoj el 65 landoj. Kiel mi, supozeble, ĉiuj, sendepende de la interesoj kaj celoj, ricevis novajn impulsojn kaj instigojn por daŭre laboradi en siaj esperantaj kampoj. Pri la multaj kunvenoj, paroladoj, intervenoj, ktp. ĉiuj povos legi en la fakaj gazetoj dum la proksimaj semajnoj. Mi ŝatus tie ĉi nur mencii la vortojn, kiuj plej impresis kaj pensigis min : *Ĉiuj popoloj bezonas memestimon ; memestimo estas kuplita kun lingvo. Popoloj, al kiuj fremda lingvo estis altrudita, iom post iom ĉesas ekzisti. Nur per libervole akceptita dua lingvo estas eble ankaŭ sukcese alporti tiun kulturon kaj etikon.* Ni do strebu, ke la popoloj havu kaŭzon libervole akcepti esperanton.

Sonja BRUN

Kaj nia ĉefdelegitino informas, ke la proksima 85a UK okazos en Tel Aviv (Israelo), tiu de 2001 en Zagreb (Kroatio) kaj de 2002 en Fortaleza (Brazilo). Ĉar ŝi pretas doni detalajn informojn al interesatoj pri tiuj kongresoj, jen ŝia adreso :

Sonja BRUN, Waldeggstr. 28, 6343 Rotkreuz. ✆ 041 790 46 40.
Retadreso :
<smbrun@freesurf.ch>

**El raporto al la gazetaro**

Mireille GROSJEAN havigis al ni esperantigon de la raporto, kiun ŝi sendis tuj post la UK al la svisa gazetara agentejo *Agence Télégraphique Suisse / Schweizerische Depeschenagentur* », kiu tre verŝajne ne taŭge plenumis sian informan taskon, ĉar neniu radio aŭ gazeto eĥis tiun raporton. En Svislando nuntempe sine de la

koncerna agentejo regas porangla ŝovinismo kaj kontraŭidealismo ege vundaj por la estonteco mem de nia lando. Estas kiel se nur la voĉoj de la dekstremuloj aŭ de la perfortemuloj estas atentindaj.

Porinforme jen citaĵoj el tiu pordepeŝa raporto :

*Dum la malfermo de la 84a Universala Kongreso de Esperanto aŭdiĝis salutmesaĝoj de s-roj Kofi ANNAN, ĝenerala sekretario de UN kaj Federico MAYOR, ĝenerala sekretario de UNESCO.*

*« Tutmondiĝo, ŝanco por paco estis la kongresa temo ». Simpozio, universitato, prilingvaj kursoj kaj ekzamenoj, aro da diversaj konferencoj estis la kerno de la kongreso, kiel la ĝeneralaj kunvenoj de multaj fakaj asocio. Granda librovendejo ofertis la ĵus aperintajn novajn titolojn. La Nobel-premiita esperantisto d-ro Reinhard SELTEN partoprenis la kongreson. Pro la uzo de esperanto la instalaĵoj por samtempa tradukado de la belega internacia kongresejo de Berlin senlaborumis dum tiu kulture densa semajno, kiun partoprenis el Svislando grupo de 40 svisoj, 13 romandoj kaj 27 alemanoj.*

Mireille GROSJEAN, ekster la koncerna poragenta raporto, esprimis kelkajn personajn impresojn citidajn :

La homoj, kiuj partoprenis la UK-n en Montpellier, bedaŭris la ĉirkaŭaĵojn de la sudfranca kongresejo : agrablajn multnombrajn restoracietojn sub grandaj arboj en kvieta tutcentra urboparto. En Berlin kvarvojaj aŭtoŝoseoj ĉirkaŭiris la luksan ICC (International Congress Center). Multaj partoprenantoj devis dum horo aŭ eĉ pli uzi la publikajn transportilojn (U-Bahn, S-Bahn, busojn, ktp...) por atingi la ICC-n.

Tamen tiuj du aspektoj rapide forgesiĝis pro la varma etoso en la kongresejo mem kaj dum la ekskursoj. La prelegoj estis tre interesaj, la tuto bonege organizita, la vetero belega.

Claude PIRON prelegis dum la NITOBE-simpozio. Mi salutis la kongresanojn nome de la svisa esperantistaro dum la malfermo, partoprenis la kunsidojn de la komitato kaj trapasigis la ekzamenojn prilingvajn.

Mireille GROSJEAN

# ILEI Konferenco
## en Karlovy Vary (Ĉeĥio)

De sabato la 7a de aŭgusto al mardo la 10a mi partoprenis la ILEI-Konferencon en Karlovy Vary (Ĉeĥio) kaj ankaŭ reprezentis Svislandon en la komitato. Plie mi prelegis pri

paco-edukado. Post propono de la Svisa ILEI-Sekcio (SIS), kun subteno de la franca kaj de la nederlanda ILEI-Sekcioj, Claude GACOND elektiĝis unuanime kun forta aplaŭdo kiel honora membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Mireille GROSJEAN

# Pri la 55a Internacia Junulara Kongreso Veszprem (Hungario)

**Amplifiki koncertis dum IJK Deko da svenoj. Eĉ la suno kaŝiĝis !**

La 55a Internacia Junulara Kongreso okazis en la urbo Veszprem (Hungario) dum la dua semajno de aŭgusto.

Oni diversmaniere povas taksi la sukceson de tiu ĉi konata kaj atendata ĉiujara aranĝo. Pro lastminuta ŝanĝo pri la kongresejo la LKK-teamo iom ŝvitis por akcepti ĉiujn partoprenantojn dum la unua tago. Meznokte kelkaj finfine ricevis ĉambrojn sen reala akceptiĝo. Sed tio estis nur detalo kompare al la multnombraj kaj sukcesplenaj programeroj, kiuj dum la tuta semajno ĝojigis nin.

Je la malferma ceremonio fajrobrigadistoj demonstris kiel ili kapablas tranĉi aŭtomobilan tegmenton. Neniu komprenis kial, ĝis ĉiuj subite malkovris, ke la fortondita tegmentero estis 1-metra verda stelo ! La fuŝita aŭtomobilo estis « hazarde ? » verda.

La stelo estis perŝnure levita al iu granda balkono antaŭ la 500 partoprenantoj, kaj tiu oficiala malfermo estis iom poste baptita de la fajrobrigadistoj, kiuj malsekigis la amason pere de siaj akvoarmiloj ! Post surprizo la freŝiĝo estis agrabla por kelkdekoj da malsekaj kaj dancantaj junuloj !

La semajna programo disvolviĝis poste en pli varma maniero, kaj etose kaj vetere. La tagaj programeroj estis diversaj kaj plaĉaj, krom (eble) la perforta vekado de ĉiuj je la 4a matene por la busa kaj trajna ekskurso al Budapest. Sed la pinto de la semajno tutcerte estis la suneklipso ! Montriĝis, ke post la malfacilaĵoj de la komenco la LKK-teamo tamen sukcesis aranĝi iun neniam viditan programeron en la tuta historio de TEJO-aranĝoj : ili malaperigis la sunon ! Veszprem troviĝas rekte survoje de la centra ombrolinio, kaj ĉiuj povis sperti en ĝojo tiun unikan momenton. Kun plena noktiĝo kaj sentebla malvarmeco la tuta afero estis sufiĉe impona.

Por ke tiu ĉi kongreso restu por ĉiam unika en la memoroj, ankaŭ la rok-grupo **Amplifiki**, unuan fojon post larmoplena disiĝo dek

jarojn antaŭe, decidis koncerti en la originala konsisto el Bertil WENNEGREN, Mike ENGLUND kaj Kim HENRIKSEN. Dekoj da – precipe inaj – fanoj svenis. Krom la kompleta koncerto de ilia konata kasedo, ili ankaŭ dancigis la homojn tutnokte kaj eĉ kantis esperantan version de la fama « kisiga himno » ***La Bamba***. Por tiuj, kiuj ne komprenas la gravecon de tiu unikaĵo, petu de iu ajn junulo, kiu partoprenis iun ajn el la TEJO-aranĝoj dum la dek pasintaj jaroj ! Neniu danĝero tamen se la *Bamba* kisigas la homojn inter si : la kafejestro disdonis amasoplene senpagajn kondomojn. Kelkaj tamen opiniis, ke tiel esperanto neniam kreskos (oni ja bezonas denaskulojn, ĉu ?).

Sed ne timu, en Veszprem partoprenis sufiĉe da infanoj por malpravigi tiun timon. Deko da ili sub 10 jaroj (inter kiuj Romain Bélisle) kreis sufiĉe familian etoson dumtage. Tio ekvilibrigis la mezan aĝon de la partoprenantaro, se oni ankaŭ enkalkulas tiujn kelkajn partoprenantojn, kiuj delonge ne plu aĝas sub la aĝolimo de TEJO, krom eble en siaj koroj. Kiel rekoni ilin ? Dumaniere : oni neniam vidis ilin post noktomezo en la diskoteko kaj ili kaŝiĝis dum la bataloj de akvopafiloj (alia ĝojoplena programero).

Ĉu restis loko, krom ĉio tio, por seriozaj aferoj ? Verŝajne jes, ĉar nova estraro de TEJO estis elektita, kiel ĉiun duan jaron. Ili certe havos seriozan defion por organizi la venontajn kongresojn. Ili almenaŭ devos aranĝi programeron por ke – tiam – ne la suno malaperu, sed la noktaj ĉielaj steloj klare verdiĝu ! Bonan ŝancon !

Mario kaj Marion BELISLE kaj ties filo Romain.


Akiru la utilegan adreslibron

***Pasporta Servo***

Dankal rabatita aĉetprezo de nur CHF 12, kiun ofertas SES


SES ofertas la adreslibron ***Pasporta Servo*** je nur CHF 12.- Mendu kaj profitu !

Unika estas la populara internacia gastiga servo per esperanto. TEJO celas atingi 1000 gastigantojn en 75 landoj en la jaro 2000. ***Pasporta Servo*** ne estas nur por gejunuloj. Multaj pliaĝuloj aĉetas la adreslibron por vojaĝi kaj renkonti homojn. La nura aĉeto de la adreslibro rajtigas uzi la servon.

***Pasporta Servo*** ankaŭ estas utila varbilo. Ĝi pruvas, ke esperanto utilas kaj funkcias, kaj ke indas lerni la lingvon.

Vi povas mendi la eldonon 2000 ĝis meze de oktobro ĉe la sekretario de SES : Angelo

MELLINI, Büntacher 21, 5626 HERMETSCHWIL
✆ 056 633 33 85. Retadreso : <mellini@compuserve.com>

# Pri la Jarkunveno de ISAE

La jarkunveno de Internacia Scienca Asocio Esperantlingva okazis en 2 partoj kadre de la UK. La parto unua enhavis la kutimajn oficialaĵojn. Partoprenis 47 personoj, inter kiuj 14 membroj. La kasisto informis pri la membr-ara-stato, kiu post la jaro 1998 kun 151 anoj restas sufiĉe stabila.

La kotizo restas la sama, tio estas CHF 30.-, kiel en la antaŭaj jaroj, kvankam ISAE eldonis en 1997 kaj en 1998 po tri kajerojn anstataŭ la kutimajn du ; kaj en 1999 ni intencas eldoni eĉ kvar kajerojn de *Scienca Revuo*.

La skribaj kasrevizadoj de la jaroj 1995 kaj 1996 fare de s-ro RÖSSLER, kiuj ankoraŭ mankis, estis akceptitaj, same kiel tiuj de la jaroj 1997 kaj specife 1998, kiujn faris la ĉefdelegitino de UEA en Svislando, s-ino Sonja BRUN. La spezkalkulo en 1998 ekmontris negativan saldon de minus CHF 857.- sed la asocia bonhavo fine tamen estas je CHF 6575.-

Post tiu unuhora kunsido okazis interesa prelego de Franz-Georg RÖSSLER pri *Simetriaj strukturoj en muziko*, kiel anoncite en la *Nova Bulteno* 50 (1999-1). Tiu oferto de ISAE enkadre de la Jarkunveno kaj la sperte prezentita temo trovis, kiel ankaŭ la prelegoj pasintjaraj en Montpellier, ĝeneralan konsenton kaj aplaŭdon.

La apero de la 50a volumo de *Scienca Revuo* signifas, kiel la prezidanto emfazis, stabilecon en la aperado de la ISAE-organo.

La sekvan vendredon la dua Parto de la Jarkunveno estis dekomence dediĉita al la en-asociaj aferoj kaj al la eldonaj problemoj de la organo *Scienca Revuo*. La plej grava diskuttemo estis la novelekto en la estraro, kies funkciperiodo finiĝos fine de 1999. Tiu estraro devas esti elekt-ita de kaj el la komitato, kies amplekso estis laŭnombre redukt-ita post la statuta decido, ke la ISAE-perantoj ne necese estas komitatanoj. Tial la serĉado de 4 novaj komitatanoj vekis viglan diskutadon. Ankaŭ eldonaj kaj administraj problemoj nutris la diskutojn de tiu por ISAE signifa kunveno.

Laŭ Rudi HAUGER, la sekretario de ISAE, kies adreso estas : Ringstr. 13, 8172 Niederglatt (ZH)

# Kongreso de KELI kaj IKUE en Gliwice (Pollando)

Dum miaj ferioj mi havis la okazon refoje partopreni la kongreson de Kristana Esperanto Ligo kuplita al tiu de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Ĝi disvolviĝis en Gliwice (Pollando). La akceptintoj en la teknika altlernejo, kie ni loĝis, prezentis al ni Gliwice, kiel la plej puran inter la malpuraj urboj de la industriita Pollando.

Kune kun Junulara Esperanto-Tendaro organizita de pastro Bernhard EICHKORN, kiu arigis 87 junulojn studantajn esperanton, ni estis entute ĉirkaŭ 300 kongresanoj. La alveno estis iom ĥaosa, sed kiam ĉiu trovis sian liton, akvon, kaj iom da sprito, ĉio ekfunkciis glate !

De tiu aranĝo mi ŝatus substreki kelkajn momentojn :

Por la unua fojo ni havis la okazon akcepti d-ron Bodjar LEONOV, la prezidanton de Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperanta.

Same eksterordinara estis la kunsido de la du estrar-komitatoj de KELI/IKUE kaj de ties ekumena komisiono. Ĝis nun tiuj kunsidoj estis samtempaj, sed ne samlokaj !

Kompreneble preĝado en ekumena aranĝo havis privilegian lokon. Frue matene je la 06h30 ! la meso estis arde frekventata de niaj katolikaj fratoj. Sed poste ili volonte aldoniĝis al la antaŭmatenmanĝa preĝo gvidata de KELI-anoj.

Tre bele kaj emociige sonis la grek-katolika bizanca rito dum la speciala vendreda Di-servo. Kvankam en katolika meso el teologia vidpunkto, ĝi ŝajnis kvazaŭ etendita mano al niaj ortodoksaj gefratoj laŭ la muziko kaj tekstoj.

Dum la kongreso ni vizitis la koncentrejojn de Oswiecim / Birkenau. Travivaĵo tre sentodensa, ĉefe pro la multnacia partoprenantaro propra al la kongreso. La ĉeestado de forta germana delegacio plialtigis la konscion de la pezo de la Historio. Tiu ĉi konscio fariĝis por mi dankemo, kiam dum la vespero mi devis gvidi la interŝanĝojn kaj la komunan ekumenan preĝon. Jam pasis pli ol 50 jaroj, sed fakte ne pli ol du generacioj. Ĉu eblas, ke nur post tiom malmulte da tempo ni povas kune preĝi kiel gefratoj kaj amikoj ?

Kiel reveninto al tiu kongreso post sufiĉe longa paŭzo, mi ĝojis retrovi la esperantan etoson, ties malfermitecon kaj ankaŭ sufiĉe altan teologian nivelon. Tre verŝajne mi estos inter la revenontoj al posta KELI/IKUE-kongreso.

Marie-Louise MÜNGER

Aldone al sia raporto Marie-Louise MÜNGER havigis al mi kvin-paĝan dokumenton ege emociigan. Temas interalie pri leteroj de Rudolf HOESS, la komandanto de Auschwitz dum la ĉefaj murdotempoj ĝis la fino. Post la falo de la nazia diktatora despotismo li estis kondamnita al pendigo en sia koncentrejo Auschwitz. Kaj lia pendigilo estas ankoraŭ videbla.

Fine de sia vivo tiu kondamnita ekskomandanto agnoskis siajn krimojn post konvertiĝo al la kristana fido. Jen ero el letero, kiun li skribis al sia edzino la 11an de aprilo 1947 :

*Destinita al mi estas vere malĝoja sorto. Kiel feliĉaj estas tiuj kolegoj, kiuj povis perei per honesta soldata morto. Mi atendas la finon trankvile kaj modere. Dekomence estis por mi tute klare, ke post forpelo kaj ekstermo de tiu ĉi nacia mondo, al kiu mi vendiĝis korpe kaj anime, mi devas perei kune kun ĝi. Mi fariĝis nekonscie unu el la radioj de grandega germana detruanta maŝino, kaj mi okupis elstaran postenon. Kiel komandanto de la eksterma koncentrejo en Oswiecim mi estis komplete kaj plene respondeca por ĉio, kio tie okazis, sendepende, ĉu mi sciis pri tio, aŭ ne. Nur dum la jura enketado kaj dum la proceso mi eksciis pri pli multaj kruelaĵoj kaj monstraĵoj, kiuj tie okazis. Ne estas eble priskribi, kiel oni trompis min, kiel oni deformis miajn disponojn, kaj kiel oni gvidis ĉion, kio tie okazis, ŝajne laŭ mia ordono. Mi esperas, ke tiuj kulpintoj ne forpasos senpune. Kiel tragika estas tio ; mi milda laŭnature, bonanima kaj ĉiam helpema, mi fariĝis la plej granda genocid-faranto, kiu malvarme kaj kun plena konsekvenco realigis ĉiun ordonon de ekstermo. Pro longjara fera edukado en SS, kiu havis celon transformi ĉiun SS-viron en senvolan ilon realigantan ĉiujn planojn de Reichsführer SS, ankaŭ mi fariĝis aŭtomato, senesplore realiganta ĉiun ordonon. Mia fanatika amo al la patrujo, kaj mia tre troigita devosento, estis bona bazo por ĉi tiu eduko. Estas peze, se homo devas, ĉe la fino, konfesi tion, ke li iris sur erara vojo, kaj ke pro tio li al si mem preparis tiun ĉi finon. Sed kion helpos ĉiuj lamentoj – falsaj aŭ pravaj ?*

En la organoj *Dia Regno* de KELI aŭ *Katolika Espero* de IKUE aldone al la detala raporto pri la kongreso en Gliwice, espereble ankaŭ aperos en sia tuteco la esperantigo de tiuj pripensigaj leteroj de Rudolf HOESS. Ili bedaŭrinde ne perdis sian aktualecon, kiam oni rigardas al aliaj mondopartoj, kie la naciisma fido kuplita al plej diversaj religiaj aŭ

rasismaj ekstremismoj daŭre kondukas al kondamnindaj genocidoj.

Claude GACOND

PS. Frukto de la aktiveco de la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI, kiun vigligas la ekumena amikeco de pastro Bernhard EICHKORN kaj pastoro Adolf BURKHARDT, estas la baldaŭa eldono de oficiala Diserva Libro de UKUE kaj KELI titolota ***Adoru - Ekumena Diserva Libro***. Sed definitive konkretiĝos la projekto nur dankal financaj helpoj. Donacoj kaj antaŭmendoj sendiĝu al Bernhard EICHKORN, Romäusring 20, DE 78050 VS-Villingen.

# Por la studemuloj


**Kvinpetalo**

Esperanto-Centro

Rue du Lavoir, FR-86410 BOURESSE

✆ kaj faksilo el Svislando

: 0033 549 42 80 74


## Kurs-programo

Septembro 10-15 : **La esperanta literaturo ekde 1952** kun Ed BORSBOOM.

Oktobro 26-30 : **Paroliga praktikado de la lingvo per noveloj de Tibor SEKELJ kaj artbildoj kun Juanita TURBILLON.**

Decembro 10-15 : **Zamenhofa semajno** kun Georges LAGRANGE.


**Kastelo Grésillon**

**Esperantista Kulturdomo**

**FR-49150 BAUGÉ**

✆ 0033 241 89 10 34


**Renovigo**

Parto de la sekureca normigo de la kastelo Grésillon, kiun trudis la aŭtoritatoj, estas farita. Dankal tio la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj povis ricevi la permeson uzi la tutan teretaĝon de sia kastelo Grésillon por la ĉi-someraj aranĝoj. Tiel la antaŭvidita programo, kiun ni anoncis en la pasinta numero de *SES informas*, povis normale komenci la 24an de julio kaj disvolviĝis tute sukcese ĝis la 21a de aŭgusto.

Krome okazis preleg-debato antaŭ okdeko da interesatoj kun sinjorino H. WALTER, profesoro pri lingvistiko en Rennes kaj Paris.

Ĝenerala kunveno de la asocio okazos la 31an de oktobro. Ĝin tuj sekvos komitatkunsido. Interalie diskutiĝos la pluaj laboroj planataj por kontentigi la loĝsekurecon en la kastelo.

Laŭ Janine VINCENT

P.P.
CH-2305
La Chaux-de-Fonds 5

Dieter ROOKE, Äussere Klus 2, 4702 Oensingen, proponas interŝanĝon de son- kaj vidbendoj kaj volonte akceptas polvo-kovritajn librojn, kiel edukan materialon por 10-jara knabo.

# MÜNSTER

## En germana Vestfalio

## 16-a

## Internacia Festivalo

**27 decembro – 3 januaro 2000**
**kun plilongiga ebleco ĝis 6 jan 2000**

Jen la aranĝo, kiun ni konsilas al ĉiuj, kiuj deziras ĝui agrablan eniron en la jaro 2000 en nekrokodila etoso. Jam 125 esperantistoj el 12 landoj enskribiĝis. Do tuj sendu vian aliĝon.

Buntas la programo por plenkreskuloj kaj infanoj : prelegoj, kursoj, promenoj, muziko, danco, tradicia silvestra balo kun bufedo, ekskursoj, ktp.

Detalan programon pretas sendi al vi Claude Gacond, PF 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds 5.

# Kathmandu

# Nepalo

## 3-a Internacia

## Himalaja Renkontiĝo

**26 februaro – 7 marto 2000**

Ni ricevis tre pozitivajn eĥojn de partoprenintoj al la unua kaj dua Himalajaj Renkontiĝoj organizitaj de Nepala Esperanto-Asocio kaj okazintaj en 1995 kaj 1998. Tial ni konsilas al vi tiun neordinaran renkontiĝon, kiu celas venigi esperantistojn el diversaj landoj por malkovrigi al ili la belaĵojn de Nepalo.

Detalan programon pretas sendi al vi Claude Gacond, PF 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds 5.